



LA INFORMILO

informbulteno pri esperanto

bulletin bilingue d'information sur l'espéranto

ELDONISTO: ESPERANTO-FEDERACIO DE ORIENTA FRANCIO

EDITEUR: Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto


Maison des Jeunes et de la Culture
27, rue de la République, 54000 - NANCY - Fr.

PCK - CCP: 1997-72 W NANCY

nouvelle série
trimestriel

3^e TRIMESTRE, 1977

n° 19



abonnement

un an: 10 F

UNU JARO: 10 F

(8 INTERN. KUPON.)

NTO★FLASH.... ESPERANTO★FLASH.... ESPERANTO★FL

REYKJAVIK, capitale de l'Islande

a accueilli 1200 congressistes de 41 pays



Jamais l'Islande, pays sans soldats, n'avait connu une invasion aussi pacifique! Le 62^{ème} Congrès de l'Association Universelle d'Espéranto fera certainement date dans les annales des grandes rencontres internationales. Ce "Congrès du Défi", comme l'a qualifié le Docteur TONKIN, réélu Président de UEA, a eu l'insigne privilège d'accueillir le Président de la République, M. Elðjárn et le Directeur Général de l'UNESCO, M. Amadou-Mahtar M'BOW.

Ce dernier, au cours d'une allocution remarquée, a insisté sur le rôle de l'espéranto qui, "à la pensée et aux valeurs spécifiques des peuples, exprimées dans leur propre langue, ajoute une possibilité de communication neutre, unique, facile et inimitable." Événement sans précédent depuis le Congrès de Vienne en 1970, le Ministre de la Culture et le Maire de la ville se sont adressés aux participants dans un espéranto impeccable.

Durant toute une semaine les autorités publiques et les Islandais eux-mêmes ont collaboré étroitement à la réussite de cette rencontre internationale. Le Congrès de REYKJAVIK est manifestement la preuve que le prestige de la langue espéranto a atteint un niveau jamais égalé.



le Dr TONKIN
président de U.E.A.

POITIERS, RENDEZ-VOUS DE 300 JEUNES ESPERANTISTES DE 20 PAYS



Sans interprète, oubliant "l'espace d'un été" leur langue naturelle, les jeunes gens et les jeunes filles du 33^{ème} Congrès de TEJO ont travaillé, échangeant leurs sentiments et leurs projets, suscitant l'intérêt évident de la presse, de la radio et de la télévision.

Au cours du Congrès les participants eurent le plaisir d'assister à la représentation d'une oeuvre d'Albert Camus, Prix Nobel de Littérature, "Les Justes", mise en scène et interprétée par la jeune troupe théâtrale parisienne du TESP.A.

7 EVEQUES ET 50 PRETRES AU CONGRES DE L'UNION CATHOLIQUE INTERNATIONALE ESPERANTISTE



37. IKUC KONGRESO

ĈESTOĤOVA
POLLANDO
17-21 VIII 1977



Les assises du 37^{ème} Congrès ont rassemblé 707 participants de 23 pays qui ont reçu un télégramme d'encouragement du Pape. L'archevêque de Cestohova, Monseigneur Barel, était présent à l'inauguration. Conférences, folklore, excursions ont occupé les Congressistes, lesquels ont tous reçu un exemplaire d'oeuvres d'un grand poète polonais, traduites en espéranto.

Rappelons que Radio-Vatican diffuse chaque dimanche une émission en espéranto.

Ekde la 2-a de januaro 1977 la Vatikana Radio dissendas ĉiudimanĉe je la h. 21.05 ĝis la h. 21.15 HEC programon en Esperanto

VARNA, "PERLE DE LA MER NOIRE," INVITE AU 63^{EME} CONGRES DE U.E.A.



Située non loin de "la plage aux sables d'or", cette grande ville de Bulgarie au passé particulièrement riche, accueillera les congressistes dans l'étonnant Palais des Sports et de la Culture. Les salles et halls de cette immense nef de verre, d'aluminium et de béton sont tous climatisés. Le grand hall peut à lui-seul contenir plus de 5000 personnes!

En dehors des travaux habituels du Congrès, les participants pourront se plonger tout à loisir dans l'eau bleue de la mer toute proche, dont la température reste en permanence entre 20 et 25°!



PREMIER CONCOURS MONDIAL DE LA CHANSON ESPERANTISTE



Il aura lieu le samedi 13 mai 1978, au Théâtre Municipal de CLERMONT-FERRAND, dans le cadre du 70^{ème} Congrès de l'Union Française pour l'Espéranto. Doté de nombreux prix et de coupes, dont l'une offerte par la municipalité, il est ouvert à tous les amateurs, individuels ou en groupes. Cette initiative anticipe un projet de création d'une chorale internationale qui pourrait se produire pour la première fois à VARNA en 1978.

MIEUX QU'UNE AGENCE DE TOURISME: un service mondial d'accueil pour les pratiquants de l'Espéranto.



Il regroupe dans un grand nombre de pays, toutes les familles s'offrant à héberger gratuitement les touristes en voyage. C'est ainsi qu'un jeune couple polonais a pu récemment apprécier l'hospitalité des espérantophones de la région Est, lors d'un voyage vers PARIS; ces contacts amicaux sans barrières linguistiques s'avèrent particulièrement enrichissants pour les partenaires; le "pasport-servo", de par son originalité, connaît un succès croissant.



de toute évidence....

...l'espéranto est bien

la langue seconde

DE L'HOMME MODERNE !

kial vi ne flugis al Rejkjaviko?

Je la komenco de aŭgusto okazis en Rejkjaviko nia Universala Kongreso. Laŭ mi tiu kongreso indas pro pluraj faktoj. Unue, dum tiu kongreso, S-r° M'BOW, Generala Doriktoro de UNESKO prelegis pri la kongresa temo "La rajto je komunikado". Ni devas konsideri, ke tiu evento estas unika en la historio de nia movado.

Ni ankaŭ povas noti, ke la islanda ministro pri kulturaj aferoj kaj la urbestro de Rejkjaviko parolis en esperanto!

Due, la Orienta Federacio kaj pli precize la esperantista grupo de BAR-le-DUC konis grandan honoron: F-in° Isabelle DENIS, filino de nia agadema amiko Pol DENIS, salutis la kongreson nome de Francujo. Jen la teksto de ŝia alparolo:

Karaj esperantoparolantoj el la tuta mondo, salutas vin junulino el Francujo!

Kiel ĉiuj membroj de nia delegacio, mi fieras pensi, ke antaŭ sep-dekdu jaroj, precize en mia lando kaj preskaŭ je la sama tago, Doktoro Zamenhof alvokis la unuajn kongresanojn profetante:

... Niaj nepoj ne volos kredi, ke la homoj de la mondo, longan tempon, ne komprenis unu la alian!...

Mi estas fakte unu el tiaj aluditaj genepoj kaj se mi konstatas, ke ne ĉiuj homoj jam komprenas unu la alian, mia ĉeesto ĉi-tie pruvas tamen mian ardan deziron pluporti la torĉon eklumigitan en Bulonjo-sur-Marco, konsciante pri tutevidenta principo: Esperanton venkigos nur la Esperantistoj!

Trie, tiu kongreso okazis en admirinda lando. Mi ne volas skribi pli longe pri la protokolumaĵoj, kiuj ne estas laŭ mi la plej gravaj eventoj de iu kongreso, sed skribi iomete pri la kongresa lando.

Islando estas nekonata lando por multaj personoj. Per diferencaj ekskursoj mi povis malkovri belegan landon. Kiam mi alvenis en Rejkjaviko, mi povis konstati kun surprizo, ke arboj ne kreskas en Islando. Sed tio estas nur unu el la malsimilaĵoj inter Islando kaj eŭropaj landoj. Dum mia veturado tra la lando mi admiris gejserojn, akvofalojn (Gullfoss) varmajn fontojn (mi eĉ banis en unu el tiuj fontoj), glaciejojn kaj vulkanojn. La islandaj esperantistoj estas tre afablaj kaj alportis klarigojn dum la ekskursoj. Unu el niaj samideaninoj havas specialan memoraĵon pri Islando: dum iu ekskurso, F-in° T. foriris kun amiko, revenis tro malfrue kaj ne plu trovis buson... ŝi devis sekve tranokti sur la islanda kamparo kaj reveturis nur la sekvantan tagon al Rejkjaviko!

Tiu kongreso okazis en bona humuro kaj la ĉeestantoj forflugis kun multe da memoraĵoj (kaj ofte kun multe da fotoj).

Ni devas iomete bedaŭri, ke la Orienta Federacio ne partoprenis multnombre al tiu kongreso. Sed ni devas rigardi antaŭen kaj mi nur deziras: "Venu multenombre en VARNA!"

Jean-Luc VANOLA

sukcesis nia 5a staĝo!

Ni estis...45! La staĝoj sekvas unu la alian kaj la nombro de la partoprenantoj estas tre regula. Okazis la kutimaj kursoj, ni parolis, ni multe paroladis (ni ja staĝumis por ĝuste babiladi!). Vespere Ges. DE ZILAH kaj F-in° GIUMMELLY prezentis al ni tre interesan muntaĵon aŭd-vidan pri PERSEPOLIS. Dimanĉe okazis ekzamenoj, partoprenis deko da kandidatoj, la ekzamenanto devis peti helpantojn, ĉar la dua ekzameno postulas ja pli da tempo. Okazis urbovizito inter du pluvofaloj. Multaj promesis reveni decembre... Ĝis baldaŭ!

Jean-Paul COLNOT

6^a staĝo de parolata esperanto

6^{ème} STAGE DE L'ESPÉRANTO PARLÉ

10an kaj 11an de decembro 1977

en NANCY, Junuĉdomo Philippe Desforges (MJC) 27 rue de

la République

Montriĝas pli kaj pli necese, por ĉiuj esperantistoj aŭ lernantoj en Orienta Francio, plej parte izolitaj en sia urbo aŭ vilaĝo, kaj ofte lernintaj Esperanton nur perkoresponde, renkontiĝi okaze de semajnfinaj staĝoj. Dum tiuj staĝoj, dank' al rektmetodaj lernolibroj diversgradaj, ĉiuj havas la eblecon paroli en esperanto. La franclingvaj gramatikaj klarigoj estas minimumaj en la kursoj A1 kaj A2, preskaŭ ne ekzistas en la kurso B kaj tute ne en la kurso C.

Ni invitas samtempe ĉiujn esperantistojn (eĉ komencantojn) en najbaraj regionoj en Francio, Germanio, Belgio kaj Luksemburgio veni por praktiki kune la vivantan internacian lingvon.

ESTOS 4 KURSOJ:

- KURSO A-1 → por tuj komencontoj
- KURSO A-2 → por ĵus komencintoj, kiuj atingis la duonon de la unuagrada kurso
- KURSO B → por tiuj, kiuj finlernis la unuagradan kurson: ili povos simple babiladi inter si helpe de la libro "POR LA PRAKTIKANTOJ"
- KURSO C → dank' al la libro "Paŝoj al plena posedo", la lingvoposedantoj fajne konfirmos kaj rigore kontrolos sian lingvoposedon.

programo

SABATON, 10an de decembro: bonvolu alveni antaŭ la 14a30, por ke la kursoj povu komenciĝi akurate je la 15a. Jen la labor-ritmo: kurso (45 minut.), ripozo (15 min.) ĝis la 19a30. Tiam okazos la komuna vespermanĝo, kaj vespere ni trapasos kune treamikajn vesperon.

ATENTU! Ĉiuj partoprenantoj, kiuj normale refoveturos dimanĉe post-tagmeze, devos liberigi la ĉambrojn kaj redoni la ŝlosilojn inter la 8a kaj 9a matene.

DIMANĈON, 11an de decembro manĝo ĝis la 8a horo
ni parolos de la 9a ĝis la 12a (samritme kiel sabate)
tagmanĝo je la 12a30

Dimanĉe posttagmeze okazos (eble!) tiu fama vizito al tropika akvario, kiun ni planas jam de unu jaro!

Eblas trapasi ekzamenon (aŭ -ojn) nome:

atesto pri lernado	}	principe	
"			praktika lernado
"			kapableco

 dimanĉe matene

Ankaŭ eblas restadi en NANCY antaŭ kaj post la staĝo, sed bonvolu precizigi tion!

La nombro de la litoj estas limigita je 50.

KOSTOJ: Aliĝkoto 7 F po familio

Manĝo (tagmeza 10 F 50
aŭ vespera)

Tranoktado kaj matenmanĝo (por unu persono)

- en unulita ĉambro 21 F (rezervitaj por la unuaj aliĝontoj)
- en du-lita 18 F
- en 3- 4-lita 16 F

(Priatentu! Tiuj prezoj validas la 1an de sept. Ili povos iom plialtiĝi)

Bonvolu detranĉi aŭ rekopii kaj sendi kun antaŭpago de 20F por ĉiu persono kiel eble plej frue kaj antaŭ la 27an de novembro al:

Sr° J. P. COLNOT
15 rue de Lavaux 54520 LAXOU
PCK 1272-21 L NANCY

(bonvolu krucumi laŭdeziro en la eta kvadrato)

S-r° S-in° F-in° nombro de personoj _____

Nomo: _____ antaŭnomo: _____ Adreso: _____

Nomo kaj antaŭnomo de eventuale akompanantaj personoj: _____

Tago kaj horo de alveno: _____ de foriro: _____

Mi rezervas _____ lito(j)n en ĉambro(j) kun _____ lito(j) sabate vespere

Suplementaj noktoj (eventuale): _____

Mi rezervas manĝo(j)n sabate vespere por _____ personoj, dimanĉe tagmeze por _____ personoj

Aliaj manĝoj (eventuale) _____

Mi partoprenos en kurso A1 - A2 - B - C -

Mi mendas la jenajn verkojn: Kursoj A1, A2, Infanoj: "JUNULKURSO 15 F

"SUPLEMENTO" 3 F

"KASETO" 30 F "DISKOSERIO" 20 F

Kurso B: "Por la Praktikantoj" 18 F - Kurso C: "Paŝoj al plena posedo" 20F

Por ĉiuj (eventuale, laŭdeziro) Lexique Fundamental E°-Fr.: 9 F Dict. Prat.: 28 F

dict. franç. es° 24F - Gd Diction. E° / Fr.: 50 F -

Mi deziras trapasi ekzamenon: Atesto pri lern. - pri praktika lern. - pri kapabl. -

Bonvolu eventuale antaŭmendi la kurslibrojn, kiujn vi ne posedas kaj bezonas. Ili estos en NANCY la 10an de decembro (por sendo per poŝto aldonu 30% ĝis 10F, 20% ĝis 50F, 10% poste - por "rapida sendo" oni aldonu plie 10%!)



SE VI SPORTUMAS, BICIKLUMAS... AU TUTE SIMPLE PIEDUMAS!...

... aĉetu la jam famekonatajn "To-Trikotoj"n kun surskribo "63a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO" V A R N A 1978!

Koloroj: blanka aŭ flava. Teksto reliefe verda kaj ruĝa.

Jen artikolo per kiu vi povos plezurigi viajn infanojn, konatulojn... aŭ vinmem!
Ekzistas 6 dimensioj de la "6-jara... ĝis la... tajlo 50!

Tiu propagandilo grandskale efikas kaj estigas tre ofte demandojn pri esperanto.
Kelkaj pecoj kun la surskribo "UK de REJKJAVIKO" estas ankaj haveblaj.
La prezo (35F por plenkreskulo) malaltiĝas kaze de mendo de 10 pecoj (28F)

Ĉiujn informojn sendas nia samideano COLNEY, respondanto de _____

INTERNACIA PŔSTISTA ESPERANTO-ASOCIO franca sekcio
B P 126 05000 GAP CEDEX



al ĉiu esperantisto, unu "To-trikoto"!





d'après Morris

DUAGRADA PERKORESPONDA KURSO

Kun ĝojo mi povas anonci, ke F-in^o MOUREAUX trafis la lastan paŝon de la libro "Paŝoj al plena posedo", kaj ke S-r^o LUDWIG bonege ellernis la libron "Por la praktikantoj".

Alia ĝojo estis donita de nia junulo fraŭlo LINDAU, kiu kuraĝe kaj esperdone komencis la studon de la sufiĉe malfacila lernolibro "Preparado al kapableco".

Mi esperas, ke multaj aliaj faros la saman laboron, porke en nia orienta federacio estu multaj spertaj esperantistoj, despli ke nur spertaj esperantistoj kapablas bone montri la taŭgecon de esperanto por kiuajn temo preparolata.

Ni laboru, ni laboru konstante. Ne tuj alvenos la venko, sed ankaŭ dank' alni ĝi alvenos. Ju pli ni estos, ju pli ni estos sperta kaj laboremaj, despli rapide ni vidos la celon.

Ke neniu restu rande de la vojo. Ke ĉiuj marŝu antaŭen, ĉiam antaŭen, kun espero!

R. DEGRELLE

P.S. - Aldonendas, ke Dominique GREINER (14 jara) atingis la 12an lecionon de la libro "Por la praktikantoj", S-r^o DEGUINES la 11an (sed mi scias, ke li multe laboras sur alia poresperanta tereno), S-r^o MULLER la 7an, S-in^o NAU la 5an. Ke ĉiuj profitu la novan lernaron por reekigi la laboron kaj instigi aliajn same agi!

— S-r^o MEIER (67 Wickersheim), kiun mi gvidas perkoresponde en la 2agrada kurso finlernis la unuan libron ("P.L.Pr."). Li krome gvidas mem plurajn unuagradajn lernantojn kaj perletere incitis kelkajn personojn en sia regiono aliĝi al nia kurso.

J.P. COLNOT

BONVOLU ATENTI ! Jen freŝa sciigo rilate al la kotiztabelo, kiun vi ektrivos en ĉi-tiu numero de LA INFORMILO:

"Pour les nouveaux membres titulaires et titulaires-juniors adhérant avant le 31 décembre 1977, il est consenti exceptionnellement pour 1978 une cotisation de faveur de 40F (plus 10F pour l'abonnement à LA INFORMILO)"

kion opinias la staĝanoj...

La 24/25ajn de junio mi havis la plezuron partopreni la 5-an staĝon de Esperanto. Ĝi konsistas el diversgradaj kursoj. Persone mi partoprenis la C-kurson, kiun lerte gvidis S-r° DEGRELLE. Ni legis en la libro "Paŝoj al plena posedo". En ĝi ni ĉerpis interesajn legaĵojn, kiuj okazigis viglajn kaj fruktodonajn diskutojn. Ĉiuj parolis nur en Esperanto, kaj tio igis la etoson tre entuziasmiga. Kun plezuro mi povis konstati, ke freŝaj esperantistoj jam f'ue kaj bone parolas. Ni vivis do dum du tagoj sur verda insulo: ESPE-RANTUJO.

Mi havas la impreson, ke la partoprenantoj de tia staĝo pli aktive kaj pli fervore partoprenas ol dum federacia kongreso. Tial, mi opinias, ke la organizantoj, al kiuj ni estu dankemaj, ja sukcesis tiamaniere interesigi kaj allogi la samideanojn. Ni esperu daŭran sukceson al tiaj staĝoj, por la prospero de nia lingvo.

André GROSSMANN

El iu tasko de S-r° LUDWIG ("Por la Praktikantoj", kurso B)

Ĝis nun mi neniam partoprenis internacian renkontiĝon, do mi ankoraŭ ne vere povas priskribi tian atmosferon. Sed en NANCY mi jam havis unuan okazon por vidi, kio estas ebla per esperanto. Unue mi estis ravita, kiam mi rimarkis, ke mi komprenis sufiĉe facile, kiam la aliaj kurspartoprenantoj parolis. Sed ne nur kiam la kurspartoprenantoj, ankaŭ la spertaj esperantistoj parolis...mi ofte facile povis kompreni.

Pro tio ke mi lernis la lingvon perkoresponde kaj ĉar mi ne niam aŭdis paroli la lingvon, mi iom timis ne bone kompreni aŭ malbone prononci. Tute ne, ankaŭ tio ne estis mal-facilaĵo. Pli mi multe ĝojis pro la atmosfero dum la staĝo, kie homoj, kiuj ne sin konis reciproke, tuj komencis paroli unu kun la alia, eĉ kiam oni iom timis paroli.

La konkludo estas demando: kiam la venonta staĝo?

El S-r° J. LINDAU (Thionville) kurso C

"Mi diru, ke la staĝo estis tre agrabla kaj plaĉis multe al mi..."

El F-in° Elisabeth RUMMEL (Phalsbourg) kiu unufoje konatiĝis kun E° en kurso A1

"Je garde un excellent souvenir de ce stage et espère participer au prochain."

SUKCESOJ EN LA EKZAMENOJ

Ĉi-jare multaj trapasis sukcese plurajn ekzamenojn. Jen la kompleta listo, okaze de niaj du lastaj staĝoj:

1/ Atesto pri lernado: CLERET Gilbert, FINANCE J.F., HOUVION Maxime, LESOUBE Gérard, Meier Claude, LINDAU Jacques, DE ZILAH Eugène, DE ZILAH Edgar, DEGUÎNES Jean-François, GUMMELLY Brigitte, LUDWIG Edmond, PANCHAUD André, RANTOANINA Romain.

2/ Atesto pri praktika lernado: GODART Marcel, GROLLEMEUND Pierre, LINDAU Jacques, PANCHAUD andré, DENIS Isabelle, DENIS Camille.

Estas agrable gratuli ĉiujn laŭreatojn pro ilia bela kaj kuraĝiga sukceso, kiu devenas de ilia konstanta laboro kaj bona helpo, de la profesoroj. Ĉu nun estas utopie opinii, ke multaj inter ili daŭre studos por sukcese trafi la sekvan ekzamenon? Por venki, esperanto bezonas sindonemajn, kapablajn kaj laboremajn Esperantistojn. Nur Esperantistoj alportos la finan venkon de Esperanto. Do, ek al la laboro, senĉes sentime, kuraĝe kaj esperplene!

Roger DEGRELLE

NACIA VARBADO

Tiuj, kiuj mendis aŭ ricevis biletojn koncerne la enketon 77-78, bonvolu resendi ilin kun la monon al

Roger DEGRELLE, 11 Cours Léopold,
54042 NANCY CEDEX

Tiuj, kiuj deziras ricevi biletojn pliajn, bonvolos peti ilin de la sama persono. Ni esperas, ke multaj laboros por tiu sufiĉe grava afero.

R. D.

geedziĝo ★

Bertrand DENIS, filo de niaj geamikoj Pol DENIS en BAR-le-DUC, edziĝis la 19an de julio en KAYSERSBERG (68240) kun F-in^o Sabine JUDLIN.

Ni bondeziras multe da feliĉo al la junaj geedzoj kaj gratulas la gepatrojn!

ESPERANTO EN SVISLANDO

Fine de julio mi havis okazon tranokti en gastejo Edmond PRIVAT kaj viziti la atingiĝojn de niaj svisaj amikoj, afable gvidita de Claude GACOND, la sekretario de KULTURA CENTRO ESPERANTISTA.

Mi jam scias, ke mankos sufiĉa loko en la nuna INFORMILO por raporti detale pri la atingoj de KCE. Krom KCE mem (kies celo estas disvastigi E-on ĉefe pere de programita kurso, organizi semajnfinojn, ktp), niaj amikoj starigas nun GEP (GASTEJO EDMOND PRIVAT) kie oni povas tranokti por ĉeesti la kulturajn semajnfinojn (aŭ simple vojaĝante en JURASO) Pri ĝi vi trovos informfolion aldonitan al ĉi-tiu INFORMILO. Poste ni pli detale informos vin pri la aliaj svisaj atingoj: kampanjo "ESPERANTO EN LA LERNEJOJ", Internacia Fiera Altlernejo, CDELI (Centro de Dokumentado kaj de Studo pri la Internacia Lingvo)?

Mi nur diru hodiaŭ, ke la svisa laboro estas admirinda kaj meritas nian tutan atenton, kaj laŭpove nian helpon.

J.P.C.

AUTUNA KAMPANJO DE U.F.E.

Ĉiuj aktivuloj kaj ĉiuj personoj kapablaj aktivi en nia Federacio ricevis jam antaŭ la someraj ferioj cirkuleron el S-r^o J.L. TEXIER pri la ESPERANTO-SEMAJNO de UFE, de la 1a ĝis la 8a de oktobro. Mi esperas, ke ĉiuj atente tralegis tiun cirkuleron kaj ke ĉiu provos, almenaŭ parte, efektiviĝi en sia ĉirkaŭaĵo la proponiatan agadon, eĉ se ne en la indikita semajno (en NANCY ni agos iom poste)

Mi esperas, ke kursoj ĉie ekfloros en nia regiono, kaj ke novaj lernantoj abunde eniros la esperanto-movadon. La sindo ĉiam aktivuloj ne forgesu raporti akurate, pri la laboro farita, pri la aperintaj gazetartikoloj, eĉ pri projektoj...

1/ al UFE

2/ al mi, por aperigo en la INFORMILO

Laŭ la eblecoj, ni jam aperigos en la nuna INFORMILO la informojn, kiujn ni ricevis el la diversaj aktivuloj. Sed, plej grave, en tiu-ĉi Informilo, ni nepre devas anonci la decembran staĝon kaj la tabelon de la novaj kotizoj kaj novaj abonoj por 1978. Ĉar Pol DENIS devas zorgi tute sola la tutan fabrikadon de la bulteno, ĉar ankaŭ la paĝonombro de la bulteno ne povas senĉese pligrandiĝi pro tempaj kaj financaj limigoj, ni jam scias, ke ni devos prokrasti diversajn artikolojn ĝis la INFORMILO 20, aperonta dum januaro.

TELEVIDA ELSENDON PRI ESPERANTO!

lasta minuto!

Vendrede, la 28an de oktobro, FR3 elsendos je la 19a20 (en "Tribune libre") pri ESPERANTO.

Bonvolu spekti tiun elsendon kaj eventuale skribi vian opinion al FR3.

SAINT-DIE**nia vivo en...**

Nia grupo (sep viroj kaj kvar virinoj) fartas bone. Ĉiun semajnon ni daŭrigas la studon de la internacia lingvo per la "Junulkurso" por la virinoj, kaj per la "Nova racia kurso" por la viroj.

Krome mi partoprenas al la "esperanto-semajno". Post ĉeesto de la jara kunveno de FFEA en la Grande-Motte mi organizos E^o ekspozicion en nia lokalo "Les Amis du Rail". En apuda ĉambro okazos regule "kurseto" 10 minuta por 6 aŭ 8 personoj, esperantistal instigi interesulojn al plua lernado.

★

M. GODART

THIONVILLE

Mi sukcesis informi pri esperanto en la liceo, kie mi instruas, kaj mi devas diri ke, mirinde, la lernantoj estis tre interesitaj. Mi parolis pri tio nur en kadre de miaj oficialaj kursoj pri filozofio - kaj eĉ laŭ peto de la lernantoj mem - Ek de tio sekvis, ke mi devis fari kursojn por kelkaj el ili. Sed ĉiuj miaj lernantoj devas trapasi la abituriantan ekzamenon, kaj do havas malmulte da tempo por eksteraj aktivaĵoj; tamen multaj serioze interesiĝis. Multaj aĉetis lernolibron (en unu el la klasoj preskaŭ ĉiuj!). Mi konstatis, ke la lernantoj parolis al siaj amikoj pri E^o, la estroj tute pozitive akceptis, ke mi faru tiujnkursojn, la etoso kaj la tereno estus do favoraj, mi tre esperas, ke mi restos en la sama liceo vrontjare.

C. NOURMONT - MOON

★

SELESTAT

S-r^o Yves GUEGUENIAT (agregacia instruisto pri beletro, lernanto de nia supera perkoresponda kurso) sendis la jenan leteron, kiu aperis en la gazeto "LE MONDE" la 15an de junio:

UN PROFESSEUR AGREGE DE LETTRES ECRIT:

...Espérantiste débutant, je viens d'assimiler en trois mois les bases de l'espéranto c'est-à-dire la partie théorique complète, plus 2000 racines.

Je regrette de ne pas avoir commencé plus tôt l'étude de la "LINGVO INTERNACIA" (je ne traduis pas... vous avez compris).

Je pense qu'au XXème siècle il n'y a pas d'humanisme véritable sans l'espéranto. Cette langue est vivace et dynamique; elle correspond à un besoin réel. Elle a survécu à de nombreuses persécutions. elle se développe avec insolence, au nez des Etats et des lobbies qui la boudent puérilement.

Il me semble aujourd'hui peu réaliste -pour ne pas dire arriéré- de vouloir se borner, ou se résigner, pour communiquer, aux langues à prétention hégémonique: l'anglais le russe, le chinois, etc...

En dépit des boycottages nationalistes, l'ESPERANTO VIVRA. Je mettrai, pour ma part le meilleur de moi-même dans l'étude et la diffusion de la seule vraie langue internationale. Je crois en l'espéranto.

Y. G.

Post sia edzo, S-in^o GUEGUENIAT siavice eklernos E^on por ĝin instrui en sia liceo. La intereso por Esperanto estas grandega en la liceo de Selestat, instruistoj pri Historio kaj Geografio esperas per ĝi ricevi dokumentojn el la tuta mondo.

Unuagrada kurso malfermiĝos en oktobro kaj en la liceo, kaj en la Junuldomo.

NANCY

★

En la CENTRA JUNULDOMO PHILIPPE DESFORGES vesperaj kursoj okazos ĵaŭde je la 18a30 kaj je la 20a30 ek de la 27a de oktobro.

En VANDOEUVRE en MJC ETOILE, kurso okazos je la 16a horo.

MUNSTER

★

S-r^o LUDWIG (instruisto pri germana lingvo) tre baldaŭ malfermos kurson en la liceo.

cotisations 1978

Vous venez de recevoir le n° 19 de la INFORMILO. Il constitue l'avant-dernier n° de votre abonnement pour 1977.

Mais vous êtes certainement désireux de continuer à recevoir notre bulletin. A cet effet nous vous présentons ci-dessous les différentes cotisations pour 1978 et nous vous invitons à les payer dès maintenant. Non seulement vous nous faciliterez le travail mais surtout vous vous éviterez tout retard dans l'envoi des bulletins et revues correspondant à vos cotisations ainsi que dans l'envoi des coupons 1978 qui vous donnent droit aux services des délégués de UEA. Ces coupons vous seront envoyés avec la INFORMILO qui suivra l'encaissement de votre cotisation.

Soyez donc parmi ceux qui, dès parution du 1er n° de LA INFORMILO en 1978, seront à jour de leurs cotisations, vous évitant ainsi la désagréable surprise du rappel traditionnel!

Vous avez deux possibilités pour payer cette cotisation:

1°/ par virement postal à: FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO

→ CCP 1997 72 W NANCY

2°/ par chèque bancaire à l'ordre de la même Fédération (Ce chèque doit être envoyé à notre trésorier, S-r° André GROSSMANN, 5 rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM)

TABLEAU DES COTISATIONS 1978

CAT.	- de 22 ans	+ de 22 ans
	1 - <u>ABONNEMENT SIMPLE A "LA INFORMILO"</u>	10 F
2 - <u>ADHESION SIMPLE UNIQUEMENT A LA "FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO"</u>		
- membre fédéral avec abonnement à "LA INFORMILO"	8F + 10F	8F + 10F
- membre fédéral sans abonnement (pour les autres personnes de la famille...)	8F	8F
3 - <u>ADHESION A LA FEDERATION ET A L'U.F.E.</u>		
- membre titulaire junior (avec la revue "Franca Esper-°)	55F + 10F	
- membre titulaire (+ de 22 ans) reçoit aussi "F.E°"		80F + 10F
- membre sympathisant	20F + 10F	20F + 10F
4 - <u>ADHESION COUPLEE A U.F.E., A U.E.A. ET A LA FEDERATION</u>		
- membre individuel (reçoit FE et l'annuaire de UEA) + la revue KONTAKTO si moins de 25 ans	99F + 10F	124F + 10F 124F + 10F
- membre individuel (reçoit FE, l'annuaire de UEA et la revue mensuelle mondiale "ESPERANTO" + la revue KONTAKTO si moins de 25 ans	165F + 10F	190F + 10F 190F + 10F

IMPORTANT ←

- A/ Tous les membres reçoivent la carte de membre fédéral et le bulletin trimestriel régional "LA INFORMILO" (pour les abonnés)
- B/ Les membres de l'UFE et de l'UEA reçoivent en plus les cartes de membre de UFE et de UEA (pour les nouveaux membres) et les coupons 1978 donnant droit au service des délégués mondiaux dont l'adresse se trouve dans l'annuaire de UEA.
- C/ Les membres de l'enseignement sont invités à mentionner leur profession car ils seront ainsi d'office inscrits au GROUPE DES EDUCATEURS ESPERANTISTES (GEE) sauf catég. 2
- D/ Les jeunes gens jusqu'à 25 ans doivent mentionner leur date de naissance et ils seront inscrits d'office à l'ORGANISATION DE LA JEUNESSE ESPERANTISTE FRANCAISE (JEFO) sauf catégorie 2. Ils pourront recevoir en plus le bulletin "KONCIZE" (voir cotis. spéc.)

E - Les membres qui payent leurs cotisations par l'intermédiaire du GEE ou de JFEO ainsi que les membres à vie, sont priés de payer à part uniquement l'abonnement à la INFORMILO (10F) comme indiqué précédemment.

F - Exceptionnellement, les membres du groupe de STRASBOURG, dont la trésorière est S-in° Stahlberger Madeleine, 17 rue de Lampertheim, 67800 BISCHEIM, sont priés de verser leurs cotisations au CENTRE CULTUREL ESPERANTO, ccp 499 17 STRASBOURG, en y ajoutant leur cotisation au Groupe qui s'élève à 10F.

VOUS POUVEZ EGALEMENT choisir un abonnement aux revues suivantes entièrement rédigées en espéranto et le régler à notre trésorier qui transmettra:

ESPERANTO	(revue officielle de UEA) abonnement simple		66 F
KONTAKTO	revue pour la jeunesse (adolescents)	1 an, 4 nos	33 F
KONCIZE	bulletin européen pour jeunes gens	1 an, 6 nos	12 F
KULTURAJ KAJEROJ	revue culturelle	1 an, 6 nos	25 F
HEROLDO DE ESPERANTO	revue d'information format journal	18 nos par an	56 F
HOMO KAJ KOSMO	revue de vulgarisation scientifique	1 an, 4 nos	10 F
LITERATURA FOIRO	revue littéraire	1 an, 4 nos	30 F
SCIENCA REVUO			34 F
JUNA AMIKO	dans un style simple pour débutants	1 an 3 numéros	12 F
MONDA KARUSELO	nouveau magazine en E°	1 an 4 numéros	10 F
HORIZONTO			40 F
SCIENCA MONDO			17 F
INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO			22 F
EUROPA DOKUMENTARO			33 F

Les revues ci-dessus sont neutres vis-à-vis des dogmes politiques ou religieux.

Celles qui suivent peuvent être considérées comme "engagées":

DOMOTO	revue japonaise (philosophie religieuse)	1 an, 6 nos	28 F
ESPERO KATOLIKA		1 an	30 F
FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO		1 an	10 F
DIA REGNO	internationale, protestante,		35 F
SAT-AMIKARO	bulletin mensuel des trav. espér. franc		42 F
SENNACIULO	même tendance mais <i>anationaliste</i>	1 an	66 F
EL POPLA ĈINIO	mensuelle, en couleurs,	1 an	10 F
		2 ans	15 F
		3 ans	20 F
BIBLIA REVUO			35 F

— En outre il est également possible de commander à notre trésorier



★ Des feuillets de propagande comprenant 9 vignettes collantes (4X3 CM) avec l'inscription "Esperanto, Universala Lingvo" et une étoile verte. Chaque vignette comporte en outre un texte différent comme le montre la reproduction ci-contre.

2 feuillets (18 vignettes) 1,50 F

15 feuillets (135 vignettes) 10,00 F

★ Cartes de visite pour présenter succinctement l'espéranto. Outre

quelques informations sur la langue, la carte indique l'adresse de UFE.

Un espace est laissé en blanc pour personnaliser votre envoi. Les 10 cartes: 2,80 F


★ LEXIQUE FONDAMENTAL E° -FRANCAIS (Léger) 7,45 F

MI AMIS JUNULINON Correspondance d'un pasteur avec un jeune africain sur les problèmes de l'amour et de morale sexuelle 11 F

(prix indiqués "franco", en vigueur au 15 10 77, peuvent être modifiés)



12



KRUCVORT-ENIGMO ★

1									
2									
3									
4									
5									
6									
7									
8									
9									

- 1 - ĝi havas belajn sangoruĝjn foliojn en aŭtuno.
- 2 - pronomo - preskaŭ ido - escepte de
- 3 - gardisto de brutoj - substantiva sufikso
- 4 - ĝardena arbedo - prepozicio. 5 - sen senlumo - u/
- 6 - konstelacio - kemia sufikso flavkolora
- 7 - pro nenia kaŭzo - simbolo
- 8 - prenante super la ĝusta mezuro - atentu
- 9 - noktobirdo - la pli malgranda elemento

VERTIKALE 1 - li baldaŭ alvenos 2 - nek vi, nek li ofte barbulo - muzika noto 3 - prepozicio - sur la korto de la farmobieno 4 - Difinita okazaĵo - la

persono 5 - aŭstralia birdo - kiel pruo 6 - en kartaro - grasi per likvaĵo 7 - rilate al - acidaj folioj 8 - bronza/konuso/kun frapilo 9 - knedebila aŭ fleksebla - en tranĉo en surfacaĵo. n n

SILAB-ENIGMO ★

Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj "silaboj", vi plenigu la kolonojn laŭ la donitaj difinoj dekstre. La 1a kaj 3a kolonoj eldonas proverbon se vi legos ilin vertikale.

am ama baŭ ci da di di ic il io ki ko kre lo lu mi mo no no no nu ra si sis so su to tri u u ur vu

- + - + - - - teksebla vegetalo
- + - + - - - ĝi odoras anizo
- + - + - - - ĉe la enirejo de la gorĝo
- + - + - - - la unua kaj la alia
- + - + - - - sub la stelsemita standardo
- + - + - - - eksoni al la suno
- + - + - - - esti persvadita
- + - + - - - ino de granda plandulo
- + - + - - - komprenkapabla
- + - + - - - plekti fadenon en maŝoj
- + - + - - - maldolĉa
- + - + - - - tertremo

solvoj de la n° 17

KRUCVORTOJ / admoni - etudo - inko - notoso - iran - ree carism - isi - arp - top - kojot - okapio - te int - paregorika

SILABENIGMO / koto - iriso - unu - nenio - etero - regento - imamo - sojlo - kano - apatia - sesio

proverbo: "kiu ne riskas, tiu ne gajnas"

* Gastejo Edmond Privat *
* Foyer *

ĜENERALAJ INFORMOJ

MODERPREZA RESTADEJO

GASTEJO EDMOND PRIVAT estas nun en starigo. Ĝi celas meti je la dispono de la kursanoj de INTERNACIA FERIA ALTLEŬNEJO, de la kunlaborantoj de KULTURA CENTRO ESPERANTISTA kaj de feriantoj moderprezan kaj mezkomfortan restadejon.

SITUO

GASTEJO EDMOND PRIVAT situas en la montaro JURASO je 1100 m de alt-eco, borde de la urbo LA CHAUX-DE-FONDS, en ege kvieta kvartalo. En tuja proksimeco troviĝas vastaj paŝtejoj kaj arbaroj, facile atingeblaj suproj, multaj promenvojoj. La skilifto CHAPEAU RABLE kun sia lumigita deklivo vintre invitas al skiado eĉ dumnokte. Alvenas la trolebuso No 6 ĝis je 100 m de la feriejo.

PRINCIPO DE LA MEM-MASTRUMADO

La ĉambroj de GASTEJO EDMOND PRIVAT estas unu-, du- aŭ kvar-litaj. La komuna vivo estas bazita sur la principo de la mem-mastrumado. La gastoj mem faras sian liton, mem pretigas siajn manĝojn kaj mem zorgas pri la puŝeco de la ejoj: dormoĉambro, kuirejo, ktp, kiel en natur-amika domo. Dank' al tio la restadprezoj estas ege malaltaj.

LITAJ KAJ RESTADKOSTOJ

Nuntempe jam estas je la dispono de la gastoj 12 litoj: 2 en unu-litaj ĉambroj (tranoktado: svisaj Fr 8.-); 4 en du-litaj ĉambroj (tranoktado: Fr 6.-) kaj 6 duetaĝaj - 4 en unu ĉambro kaj 2 en alia (tranoktado: Fr 3.-). Sinlavado okazas en transformitaj kuirejoj. Ne jam ekzistas duŝoj. Ekzistas kuirejo, manĝoĉambro kaj ĝardeno terasó. La ĉi-supre indikitaj prezoj estas kalkulitaj sen lit-tukoj; por tiuj, kiuj alportas la proprajn lit-tukojn aŭ dormosakon. Luado de littukoj: po Fr 6.- por la unua nokto, sekvantaj noktoj de la semajno po Fr 1.- por ĉiu nokto.

LIT-REZERVADO

Skribe informiĝu, ĉu la dezirata(j) lito(j) estas libera(j) en la antaŭvidita restad-periodo. Indiku tre ekzakte viajn alven- kaj forir-tagojn. Skribu tre legeble viajn nomojn familian kaj individuan kaj vian adreson. Ne forgesu aldoni 2 internaciajn respondkuponojn (svisoj Fr 1.- en poŝtmarkoj). Respondon vi tuj ricevos. Se la litoj estos lueblaj, antaŭpagon oni petos de vi por la rezervado. Akompanos la respondon urbo-plano kaj pli detala informilo.

ADRESO

Ĉiujn korespondaĵojn direktu al: Gastejo Edmond Privat
Kultura Centro Esperantista
Telefona: 039 26 74 07 Poŝtfako 621, Postiers 27
Poŝtkonto: 23-2921 CH-2301 LA CHAUX-DE-FONDS (Svislando)